

**TION DIRAS VI: MI ESTAS REĜO. – Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Johano 18, 33b-37**

**[En tiu tempo], Pilato demandis de Jesuo: „Ĉu estas vi la reĝo de la Judoj?”**

**Jesuo respondis: „Ĉu vi demandas tion mem, aŭ aliaj parolis al vi pri mi?”**

**Pilato diris: „ Ĉu estas Judo, mi? Via gento mem kaj la ĉefpastroj transdonis vin al mi; kion vi faris?”**

**Respondis Jesuo: „Mia regno ne estas el ĉi mondo; se mia regno estus el ĉi mondo, miaj subuloj batalus, por ke mi ne estu transdonita al la Judoj. Sed mia regno ne apartenas al ĉi mondo.”**

**Tiam Pilato denove demandis Lin: „Ĉu vi, do, estas reĝo?”**

**Jesuo respondis: „ Diras vi, ke Mi estas reĝo. Por tio mi naskiĝis kaj venis en la mondon: por atesti la veron. Ĉiu, kiu apartenas al la vero, aŭskultas mian voĉon.”**

La evangelio de Johano prezentas la unuan demandadon al Jesuo fare de Pilato. Pilato jam konis Jesuon, li Lin arestigis pere de siaj gardistoj. Ni legu la evangelion.

*Pilato tiam eniris en la guberniestran palacon, vokigis Jesuon kaj demandis de li: Ĉu estas vi la reĝo de la Judoj?”* La demando de Pilato ŝajne montras lian surprizon: al li oni diris, ke tiu Jesuo estas la atendita mesio, la reĝo de la judoj, tiu, kiu per ribelo neniigos la tutan povosistemon, forpelos la romianojn; evidente la persono de Jesuo ne aspektis simila al batalema ribelulo, kaj tial Pilato esprimas surprizon.

Nu, Jesuo ne respondis. Jesuo, la akuzato, demandas la juĝiston Lin juĝontan.” Ĉu vi demandas tion mem, aŭ aliaj parolis al vi pri mi?”

Li ne respondas la demandon, sed invitas Pilaton al persona rezonado. Tion li jam faris, kiam gardisto lin vangofrapis \_ Tiam Jesuo diris “Se mi agis malbone, montru al mi, kio estis malbona, se mi ne agis malbone, kial vi min perfortas? – Nun Jesuo klopodas konvinki Pilaton al persona rezonado. Sed la

demandon de Jesuo sekvas kolera reago de Pilato: "*„Ĉu estas Judo, mi?”*". En tiu esprimo vidiĝas klare, kiel la guberniestro malestimas la popolon de li regatan.

Kaj jen la akuzo: "*Via gento mem kaj la ĉefpastroj transdonis vin al mi; kion vi faris?*" Estas ĉiuj kontraŭ Jesuo. Johano tion skribis en sia prologo (ĉap. 1): "*li venis inter la siajn, sed la liaj lin ne akceptis*". Sed ne nur tiuj, kiuj tenis la povon – oni povas kompreni la starpunkton de la ĉefpastroj, ĉar la Jesua mesaĝo deprenas la povon, ĉar la Dio de Jesuo ne estas Dio de tera povo, sed amo por servado al la homoj, - sed ankaŭ la popolo, ĉar ĝi estas regata de la eklezio, kaj tio donas sekuron.

Do, ĉiuj kontraŭ Jesuo. Sekvas la demando: "*kion vi faris?*"? Pilato jam scias tion, la eminentuloj jam diris (Joh. 38, 30): "Se li ne estus krimulo, ni ne estis transdonintaj lin al vi". Nun fine Jesuo respondas al la unua demando ("*Ĉu estas vi la reĝo de la Judoj?*") Respondis Jesuo: „Mia regno ne estas el ĉi mondo": tio ne signifas, ke li distingas inter ĉielo kaj tero, inter du malsamaj mondoj, sed ke Lia regno ne similas al la sistemoj de ĉi mondo. Kaj li tion diras: "*se mia regno estus el ĉi mondo, miaj subuloj batalus, por ke mi ne estu transdonita al la Judoj. Sed mia regno ne apartenas al ĉi mondo.*"

Jesuo ne havas subulojn, ĉar li estas ĉies subulo. En Lia regno ne ekzistas ia ajn formo de povo, de rego, de perforto, de trudo. Do en ĉi mondo ĝi estas, sed al ĝi alternativa.

Pilato ne konprenas, kaj demandas: "*„Ĉu vi, do, estas reĝo?”*". Sed por Jesuo reĝeco ne gravas, kaj lia respondo estas "*Diras vi, ke mi estas reĝo....*" (do tion opinias vi). Kaj Li daŭrigas, parolante nur pri sia misio: "*... Por tio mi naskiĝis kaj venis en la mondon: por atesti la veron. Ĉiu, kiu apartenas al la vero, aŭskultas mian voĉon.*" Pli frue, en la dialogo kun Nikodemo (Joh., 3, 3) Jesuo metis distingon inter tiuj, kiuj estas pretaj por la vero kaj tiuj, kiuj ne estas pretaj. Do, esti en la vero, agi por la vero, signifas agi bone. Se en sia vivo oni ne metas kiel nepran valoron la bonon de la homo kaj oni ne direktas sian vivon por doni tiun bonon, oni ne povas kompreni la vorton de la Sinjoro. Oni povas ja ĝin aŭskulti, sed ne ĝin komprenante.

Do Jesuo ne diras: "Kiu aŭskultas mian voĉon, poste eniros la veron", sed la malon. Por aŭskulti la voĉon de la Sinjoro oni devas elekti: direkti sian vivon al la bono de la homoj. Pilato tute ne povas kompreni tion, ĉar li estas la povo. Kiel por Jesuo ne gravas reĝeco, same por Pilato ne gravas la vero.

Fakte, tuj post la fino de ĉi tiu ĉerpaĵo, (Joh.18, 38), Pilato demandas, eble al si mem: "*Kio estas la vero?*"